

77-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO
20-22 julio

51-a KONGRESO de ILEI
21-28 julio



SIMPOZIA KAJERO

Madrido, 2018



FEDERACIÓN
ESPAÑOLA
DE ESPERANTO
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

SIMPOZIO

LA KULTURA HEREDAJO DE ESPERANTO

MADRIDO, 26-27 JULIO 2018

En la *Eŭropa jaro de kultura heredaĵo 2018* kaj meze de la *Internacia jardeko de proksimiĝo de kulturoj 2013-2022*, la 77-a Hispana Kongreso de Esperanto kaj la 51-a Kongreso de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) havas komunan ĉeftemon: *La kultura heredaĵo de Esperanto*. La Ibera duoninsulo, kiu heredigis multon al la kultura trezoro de la homaro kaj pliriĉigis la kulture heredaĵon de Esperanto, estas ĝusta medio por tia temo kiel ĉefmotivo de ampleksa faka, kleriga kaj kultura programo de la kongreso. Laŭtradicie, ĝi estos specife traktata en la universitata simpozio pri kongresa temo okazanta laŭtradicie en la du lastaj labortagoj de la kongreso de ILEI.

Ĉi-jare ILEI organizas la simpozion kunlabore kun la Filologia Fakultato de la Nacia Universitato de Neĉeesta Edukado (UNED – Universidad Nacional de Educación a Distancia) kaj Hispana Esperanto-Federacio (HEF). Ĝi okazos en ejoj de UNED la 26-an kaj 27-an de julio kaj estas malferma por esperantistaj kaj neesperantistaj fakuloj kaj interesatoj ebligante ilian dialogon pri temoj de komuna intereso observataj el diversaj vidpunktoj. La laborlingvoj estos Esperanto kaj la hispana. Ĉiuj aliĝintoj de la kongreso aŭtomate rajtas partopreni en la simpozio sen apartaj aliĝilo kaj kotizo.

La Ministerio pri Kulturo de Hispanio havigis al Hispana Esperanto-Federacio la rajton utiligi la emblemon de la Eŭropa Jaro pri Kultura Heredaĵo 2018, por la kongreso de ILEI, kaj por la universitata simpozio okazonta en la lastaj du tagoj, akorde kun la ĉeftemo de ambaŭ eventoj: "La Kultura Heredaĵo de Esperanto".

Celante diversaspektan traktadon – en la eŭropa lumo, en la mondskala perspektivo, en la hispana kunteksto kaj el vidpunkto de specifaj intereso de ILEI kaj de Esperanto-komunumo ĝenerale – la simpozia temo inkluzivas la jenajn subtemojn, sed ne limiĝas al nur tiuj:

- Justa komunikado kaj tutmondiĝo
- Kontaktoj inter kulturoj: harmonio kaj pliriĉiĝo
- Interreto, Esperanto kaj kultura interŝanĝo
- Reflektoj de naciaj kulturoj en la kulturo de Esperanto
- Esperanto en la kultura mozaiko de Hispanio
- Esperanto kiel ero de kultura heredaĵo de la homaro
- Kontribuo de Esperanto al la Eŭropa kultura heredaĵo
- Pedagogiaj valoroj de Esperanto-kulturo
- Interkultura lernado kaj edukado per Esperanto
- Kulturaj temoj kaj instrumaterialoj en lingvolernado

Ĉiu preleganto disponas 20 minutojn por la prelego plus 10 por diskuto.

ORGANIZA KOMITATO

Nuria Polo Cano, Facultad de Filología, UNED, prezidanto

Nicolau Dols Salas, Universitat de les Illes Balears – Institut d'Estudis Catalans, prezidanto

Manuel Pancorbo Castro, UNED, vicprezidanto

Roberto Garvía Soto, Universidad Carlos III

Duncan Charters, Principia College

Vicente Manzano Arrondo, Universidad de Sevilla

Mireille Grosjean, ILEI

José Antonio del Barrio Unquera, HEF

Manuel Parra Benito, Madrida Esperanto-Liceo

Radojica Petrović, ILEI

Félix Jiménez Lobo, HEF, sekretario

SIMPOZIA PROGRAMO

Ĵaŭdo, 26 julio 2018		
07h30–09h00	Matenmanĝo	
08h30–09h30	Akcepto de simpozianoj	Inglada
09h30–09h45	Malfermo de la simpozio	Szerdahelyi
09h45–10h15	Ilona Koutny: Eŭropa heredaĵo de esperanto - kiel tio reflektiĝas en la lingvo	Szerdahelyi
10h15–10h45	Yuro Jung & Vicente Manzano-Arrondo: Internaciigo de Esperanto. Pri la solvebla eŭropeco de la interkultura lingvo	Szerdahelyi
10h45–11h50	Kristin Tytgat: Interkultura lernado kaj la aldona valoro de Esperanto	Szerdahelyi
11h15–11h45	Paŭzo	
11h45–12h15	Silvia Barreiro: Ne-ĉeesta lingvo-instruado en la universitata medio	Szerdahelyi
12h15–12h45	Ana Manero: La fadenoj de Ariadno: kiel traserĉi la retkatalogojn de Biblioteko Juan Régulo Pérez	Szerdahelyi
12h45–13h15	Elvezio Canonica: La monaĥino-ciganino, poemo de Federico García Lorca el La cigana romancaro (1928) : interpreto kaj komparo de du Esperantaj tradukoj	Szerdahelyi
13h15–14h00	Simpozia debato pri la prezentitaj prelegoj	Szerdahelyi
14h00–15h30	Tagmanĝo	
15h30–16h00	Katalin Kováts: La tranĉilo de mia onklo malpli larĝas ol lia korto	Szerdahelyi
16h00–16h30	Ilona Koutny: Universitata instruado de esperanto kaj esperantologio: spertoj en	Szerdahelyi

	UAM	
16h30–17h00	Mónika Molnár: Esperanto priservas interkulturan edukadon	Szerdahelyi
17h00–17h30	Paŭzo	
17h30–18h00	Karina Oliveira: Signo-lingvoj kaj internacia komunikado	Szerdahelyi
18h00–18h30	Miguel Ángel González Alfonso: Kontakto inter kulturoj: harmonio kaj pliriĉiĝo	Szerdahelyi
18h30–19h00	Jérémie Sabiyumva: Justa komunikado kaj tutmondiĝo	Szerdahelyi
19h00–19h30	Simpozia debato pri la prezentitaj prelegoj	Szerdahelyi
20h00–22h00	Kongresa Bankedo	
Vendredo, 27 julio 2018		
07h30–09h00	Matenmanĝo	
09h30–10h00	Marija Belošević: Kroata kultura heredaĵo	Szerdahelyi
10h00–10h30	Irina Gonĉarova: Lingvaj festivaloj: lingva konsciigilo sub Esperanta standardo	Szerdahelyi
10h30–11h00	Carlos Spínola: Esperanta parolado pri astronomio. La misio Cassini-Huygens	Szerdahelyi
11h00–11h30	Kafpaŭzo	Szerdahelyi
11h30–12h30	Konkluda simpozia debato	Szerdahelyi

SIMPOZIAJ PRELEGOJ



Eŭropa heredaĵo de esperanto – kiel tio reflektiĝas en la lingvo

Herencia europea del esperanto – cómo se refleja en la lengua

Ilona Koutny, Interlingvistikaj Studoj, Adam Mickiewicz Universitato

Resumo: Esperanto ekestis en Eŭropo, surbaze de eŭropaj lingvoj kaj eŭropa kulturo kiun influas la antikva kaj la kristana kulturoj, ankaŭ la parte simila natura ĉirkaŭaĵo. La prelego spuros, kiel tio aperas en la vortosignifoj (koloroj, familiaj rilatoj), segmentado de la mondo, kutimaj esprimoj, proverboj kaj simboloj (ekz. ĉu porko elvokas pozitivan aŭ negativan bildon, ĉu serpento estas ruza?). Ĉu la derivitaj kaj kunmetitaj vortoj sekvas eŭropajn skemojn aŭ jam montras pli ĝeneralan strukturon? Eŭropeco, internacieco kaj specifeco de esperanto – aperos en la konkludoj.

Ŝlosilvortoj: kulturo, lingva bildo de la mondo, semantiko, frazeologio

Resumen: El esperanto se inició en Europa sobre la base de lenguas europeas y la cultura europea, influenciada por las culturas antiguas y la cristiana, y también por el entorno natural parcialmente semejante. La comunicación tratará de cómo eso se refleja en el significado de las palabras (colores, relaciones de parentesco), segmentación del mundo, expresiones frecuentes, refranes y símbolos (por ejemplo: ¿el cerdo evoca una imagen positiva o negativa? ¿es astuta la serpiente?). ¿Siguen los derivados y los compuestos léxicos modelos europeos o traslucen una estructura más general? En las conclusiones aparecerán el europeísmo, la internacionalidad y la especificidad del esperanto.

Palabras clave: Cultura, imagen lingüística del mundo, semántica, fraseología.

Aŭtoro: KOUTNY Ilona (naskiĝis en Hungario, ekde 1997 vivas en Pollando) diplomigis pri matematiko, franca filologio kaj esperantologio, poste doktoriĝis pri lingvistiko en la Budapeŝta Eötvös-Universitato (HU) kaj habilitiĝis ĉe la Universitato Adam Mickiewicz en Poznan (PL). Ŝi instruis dum jardeko ĉe la Esperanto-fako de Eötvös

Universitato, ankaŭ aplikatan kaj komputan lingvistikon. Nun ŝi estas profesoro en UAM kaj estras la Ugro-Finnan Katedron.

Ŝi fondis en 1997 kaj gvidas ankaŭ la internaciajn postdiplomajn Interlingvistikajn Studojn ĉe UAM, kie ŝi prelegadas pri internacia kaj interkultura komunikado, Esperanta lingvistiko kaj metodiko. Okupiĝas ankaŭ pri la rilatoj de lingvo kaj kulturo, pragmatiko kaj leksikografio. Profesoro de AIS, eksmembro de AdE, honora membro de ILEI.
ikoutny@amu.edu.pl; <http://www.amu.edu.pl/~inter/>

Universitata instruado de esperanto kaj esperantologio: spertoj en UAM

Ilona Koutny, Interlingvistikaj Studoj,
Adam Mickiewicz Universitato

Resumo: La prelego prezentas diversajn formojn de universitata instruado de esperanto, esperantologio kaj Interlingvistiko kun trarigardo de la nuna situacio. Poste ĝi fokusiĝas al la plena universitata studprogramo pri interlingvistiko en UAM ofertata al internacia studentaro kun la partopreno de universitataj fakuloj el diversaj landoj. La postdiplomaj studoj disponigas lingvistikajn kaj komunikajn bazojn por la studado de internaciaj lingvoj kaj speciale okupiĝas pri la lingvistiko kaj kulturo de esperanto. La instruista specialiĝo en la 3a jaro formas profesiajn instruistojn de esperanto. Temos ankaŭ pri la aldonaj eblecoj de universitata fako (esplorado, doktorigo, eldonaĵoj, kunlaboro kun aliaj universitatoj).

Ŝlosilvortoj: universitata instruado, esperantologio, Interlingvistiko, interkultura komunikado

Resumen: La comunicación presenta diversas formas de enseñanza universitaria del esperanto, la esperantología y la interlingüística con un enfoque sobre la situación actual. Posteriormente trata del completo plan de estudios universitario sobre interlingüística en la Universidad Adam Mickiewicz ofrecida a estudiantes de diversos orígenes nacionales con la participación de especialistas universitarios de diversos países. Los estudios de posgrado ofrecen bases lingüísticas y de comunicación para el estudio de las lenguas internacionales y se ocupan especialmente de la lingüística y la cultura del esperanto. La especialización en enseñanza durante el tercer año forma docentes profesionales de esperanto. Tratará también de otras oportunidades de especialización universitaria

(investigación, doctorado, publicaciones, colaboración con otras universidades)

Palabras clave: Enseñanza universitaria, esperantología, interlingüística, comunicación intercultural.

— § —

**Internaciigo de Esperanto. Pri la
solvebla eŭropeco de la interkultura lingvo**
**Internacionalización del esperanto. Sobre el
reparable europeísmo de la lengua intercultural**

Yuro Jung (Unika), Aoyama Gakuin Universitato, Japanio
Vicente Manzano-Arrondo (Viko), Universitato de Sevilo,
Hispanio

Resumo: Kiel internacia lingvo, Esperanto devas havi verajn internaciajn trajtojn, sen ĉefroleco de iu ajn kulturo rilate al la ceteraj. Tamen, ne malofte ĝi estas kritikata kiel tro eŭropeca. Ĉi tiu kontribuo celas priskribi la problemon kaj proponi kelkajn paŝojn. Pri la priskribo, gravas rimarki ke la eŭropeco aŭ okcidenteco ne referas nur al la lingvo sed ankaŭ al la movado. Pro tio, ni unue reprenos interpretojn de aŭtoroj kiel Claude Piron aŭ Goro Kimura pri la kultura biaso de la lingva disvolviĝo. Ili ne nur kritikis sed ankaŭ proponis kelkajn solvojn. Poste, ni analizos la movadon, almenaŭ iomete per ĝia struktura organizado. La celo de tia dua tasko estas montri ke la kultura biaso de la lingva disvolviĝo ne devenas de puraj lingvaj kialoj, sed estas kaŭzita kaj daŭrigita pro kutimoj kaj strukturoj. Fine, ĉi tiu laboro konkludos pere de praktikaj konsiloj, kies enhavo temas pri ambaŭ flankoj: lingvo kaj movado. Kvankam laboro kiel ĉi tiu ne povas nek rajtas esti sufiĉa, ĝi povas kontribui por haltigi la sinsekvan okcidentigon de tio, kio meritas esti vera internacia kaj interkultura lingvo.

Ŝlosilvortoj: internaciigo de Esperanto, interkulturo, okcidenta biaso.

Resumen: Como lengua internacional, el esperanto debe tener rasgos verdaderamente internacionales, sin protagonismo de ninguna cultura en particular. Sin embargo, a menudo es criticada por demasiado europea. Esta comunicación tiene por objeto describir el problema y proponer algunas soluciones. Sobre la descripción, cabe señalar que el carácter europeo y occidental no se refiere solo a la lengua sino también al

movimiento esperantista. . Por ello, primero tomaremos interpretaciones de autores como Claude Piron o Goro Kimura sobre el sesgo del desarrollo de la lengua. Ellos no solo criticaron sino que también ofrecieron soluciones. A continuación analizaremos el movimiento, al menos en lo que se refiere a su organización estructural. El objetivo de esta segunda parte es señalar que el sesgo cultural del desarrollo de la lengua no se refiere a causas estrictamente lingüísticas, sino a costumbres relacionadas con las estructuras. Finalmente, este trabajo concluirá con consejos prácticos referidos a las dos partes: lengua y movimiento. Aunque un trabajo como este no puede ser suficiente, puede contribuir a detener la continua occidentalización de lo que merece ser una verdadera lengua internacional e intercultural.

Palabras clave: Internacionalización del esperanto, intercultural, sesgo occidental.

Aŭtoroj: Ambaŭ estas aktivuloj en pluraj Esperantaj organizoj, kaj partoprenas en la Interlingvistikaj Studoj de la Universitato de Poznano (Pollando).

Unika estas koreino loĝanta en Japanio, kiu studis Inĝenieradon kaj Komputilajn Sciencojn en la Hankuk Universitato de Fremdaj Studoj (Koreio) kaj Internacian Administradon en la Aoyama Gakuin Universitato (Japanio).

Viko estas hispano, kiu doktoriĝis pri Psikologio kaj pri Ekonomio en la Universitato de Seviljo, kaj pri Edukado en la Universtitato de Valadolido (ambaŭ en Hispanio).

– § –



Interkultura lernado kaj la aldona valoro de Esperanto

Aprendizaje intercultural y valor añadido del esperanto

Kristin Tytgat,

Libera Brusela Universitato, Belgio

Resumo: En la konteksto de tutmondiĝo kaj internaciĝo de ekonomiko, socio kaj kulturo la postuloj al laborontaj homoj rilate al interkulturaj kompetentecoj

konstante kreskas. En edukfakoj kiuj preparas homojn al profesiaj kontaktoj kun aliaj kulturoj, la interkultura lernado estas centra elirpunkto.

La interkultura dimensio en la instruado de fremdaj lingvoj ebligas internacian komunikadon, inkluzivante ĉion kio rilatas al kulturo: strategioj de komunikado, sociaj valoroj, malsamaj laborstiloj ktp. Studante tiun dimension lernantoj povas rezulte pli bone efektiviĝi internacian kunlaboron.

Pere de la studado de Esperanto lernanto povas malkovri la kulturon de multe pli vasta mondo ol tiu de nur la tradiciaj lingvistikaj teritorioj de EU-landoj. Dank' al Esperanto-instruistoj de la tuta mondo la nocio «interkultura lernado» okupas tre gravan lokon en la menso de la lernanto.

En la prelego ni provos trovi eblajn celojn, enhavojn kaj strategiojn de la interkultura lernado kie Esperanto povos liveri aldonan valoron.

Ŝlosilvortoj: interkultura lernado, komunikado, fremdaj lingvoj, aldona valoro de Esperanto

Resumen: En el contexto de la globalización y la internacionalización de la economía, la sociedad y la cultura, la exigencia de competencia intercultural de los trabajadores aumenta sin cesar. En asignaturas que preparan para los contactos profesionales, el aprendizaje intercultural es un tema central.

La dimensión intercultural en la enseñanza de lenguas extranjeras permite la comunicación internacional, incluyendo todo lo que tiene que ver con la cultura: estrategias de comunicación, valores sociales, sistemas de trabajo diferentes, etc. El estudio de esta dimensión puede resultar en mejoras de la colaboración internacional.

Estudiar esperanto puede hacer descubrir la cultura de un mundo más amplio que el de los tradicionales territorios lingüísticos de la UE. Gracias a los profesores de esperanto de todo el mundo la noción de “aprendizaje intercultural” ocupa un lugar de gran importancia en la mente del estudiante. En la comunicación intentaremos encontrar posibles objetivos y estrategias del aprendizaje intercultural y el valor añadido que puede aportar el esperanto.

Palabras clave: Aprendizaje intercultural, comunicación, lenguas extranjeras, valor añadido del esperanto.

Aŭtoro: Kristin TYTGAT (kiki) instruas la germanan, nederlandan kaj rusan lingvojn en la Instituto de Aplikata Lingvistiko de la Libera Brusela Universitato en Belgio. Ŝi tie preparas tradukistojn kaj interpretistojn. Ŝi spertiĝis pri interkulturaj rilatoj en kelkaj instrufakoj de la universitato, ĉefe ligitaj al la instruado de interpretado. Krome ŝi dum jaroj okupiĝas pri multlingveco. Ankaŭ la multjara organizado de universitataj interŝanĝoprogramoj inter okcidenta kaj orienta Eŭropo donis al ŝi multe da valoraj spertoj de interhoma komunikado. Kiel esperantistino Kristin ĉefe interesiĝas pri la instruado de la lingvo mem. En tiu konteksto ŝi estas kunlaborantino en la Esperanto-ekzamenoj de la Komuna Eŭropa Referenc kadro por lingvolernado. Regule ŝi partoprenas kaj kelkfoje kunorganizas Esperanto-aranĝojn, kie ŝi ĉiam provas instrui la lingvon kaj prelegi pri interkultura komunikado. Esperanto ja estas komuna lingvo, sed la parolantoj havas malsamajn kulturojn, kiuj unuflanke ĉiuj estas esplorindaj, sed aliflanke povas malfaciligi efikan komunikadon. Kristin loĝas en Antverpeno kun sia rusa edzo kaj havas aron da Esperanto-familianoj.

– § –

Ne-ĉeesta lingvo-instruado en la universitata medio

Silvia Carmen Barreiro Bilbao, UNED

Resumo: La lingvo-instruado de CUID nedisigeble apartenas al eduka katalogo de UNED. Sub la engaĝiĝo por kvalita trejniĝo, disponebla al ĉiuj, kaj kongrue al Komuna Eŭropa Referenc-kadro por Lingvoj (KER), CUID proponas 2 lerno-manierojn: duon-ĉeestan kaj ne-ĉeestan (nur-retan). Tio permesas al studento elekti la vojon lerni la lernotan lingvon laŭ liaj/ŝiaj cirkonstancoj. En tiu ĉi prelego estos priskribataj kiaj estas la nur-retaj kursoj kaj ties engaĝiĝoj por sukcesi en tiel defia lingv-instrua metodo. Al tio helpas la starigo de propra sigelo, kies kvalito kaj efiko egalas tiujn de la kupola institucio, UNED.

Ŝlosilvortoj: nur-reta kurso, senbara, universitato, lingvo-instruado, kvalito, universala

Aŭtoro: Universitata Instruisto de la Departamento pri Eksterlandaj Filologioj kaj ties Lingvistikoj, ŝi krome estas la Direktorino de CUID, Universitata Centro por Bitaj kaj Ne-ĉeesta Instruado de Lingvoj de

UNED, ekde junio 2017. Sub ŝia gvidado, la nur-retaj lingvo-kursoj estis antaŭen puŝitaj per ampleksigo de ilia lingvo-katalogo kaj per adopto de novaj teĥnologioj kiuj plifirmigas tian instru-lernan metodon, kiun studentoj unuavice preferas kiam ili elektas lerni lingvojn.

Enseñanza de idiomas no presencial en el ámbito universitario

Silvia Carmen Barreiro Bilbao, UNED

Resumen: La enseñanza de idiomas del CUID forma parte integral de la oferta educativa de la UNED. Bajo el compromiso de una formación de calidad y al alcance de todos, y siguiendo el Marco Europeo de Referencias para las Lenguas, el CUID ofrece una doble modalidad de aprendizaje (presencial y en línea), que permite a los estudiantes elegir cómo quieren aprender un idioma esté donde esté, sin barreras. En esta ponencia vamos a desgranar cómo son nuestros cursos *online*, desde los diferentes ámbitos de actuación con los que se afronta el reto de una modalidad exclusivamente en línea con marca propia, de una calidad y eficacia a la altura de la institución a la que pertenece el Centro Universitario de Idiomas Digital y a Distancia.

Palabras clave: *online*, sin barreras, universitario, idiomas, calidad, universal

Autor: Profesora Titular del Departamento de Filologías Extranjeras y sus Lingüísticas, ostenta el cargo de Directora del Centro Universitario de Idiomas Digital y a Distancia de la UNED desde junio de 2017. Bajo su dirección, se ha seguido dando un fuerte impulso a los cursos en línea, ampliando la oferta y apostando por una nueva metodología que consolide esta modalidad de enseñanza/aprendizaje que los estudiantes eligen como su primera opción a la hora de aprender un idioma.

– § –



La fadenoj de Ariadno: kiel traserçi la retkatalogojn de Biblioteko Juan Régulo Pérez

Ana Manero García, Biblioteko Juan Régulo Pérez (Hispana Esperanto-Federacio)

Resumo: Katalogo de biblioteko donas multan informon pri ĝia enhavo, sed ofte tiu ilo ne estas sufiĉe ekspluatata. Scii kiel organiziĝas la diversaj informaj elementoj ene de katalogo kaj kiu rilato estas inter ili konstituas la unuan ŝtupon de kono por bone elturniĝi dum traserĉado. La dua ŝtupo estas koni la funkciadon de la programo kaj ties serĉeblecojn. Por tion studi ni prenos kiel referencon la Bibliotekon Juan Régulo Pérez. Unue, ni konatiĝos kun ties ĉefa retkatalogo, funkcianta per la programo Koha. Poste ni esploros la Bitotekon, ĝian bitan bibliotekon, funkciantan per Dspace. En ambaŭ kazoj temas pri liberaj kaj senpagaj programoj. Per ili Hispana Esperanto-Federacio disponigas siajn bibliotekajn servojn.

Ŝlosilvortoj: bibliotekoj, retkatalogoj, serĉoj, programoj

Aŭtoro: Bibliotekisto laboranta en la Nacia Biblioteko de Hispanio, kie ŝi estras sekcion de la Departamento pri Katalogado. Prizorganto de Biblioteko Juan Régulo Pérez (apartenanta al Hispana Esperanto-Federacio) de antaŭ pli ol dudek jaroj. Kadre de sia poresperanta biblioteka agado, kunordiginto de la Projekto Bitoteko, kiu rezultigis la disponigon de la bita biblioteko de la Federacio kaj ties integriĝon en la bitdeponejojn Hispanan (apartenanantan al la Ministerio pri Kulturo de Hispanio) kaj Eŭropan (apartenantan al Eŭropa Unio).

Los hilos de Ariadna: cómo buscar en los catálogos en línea de la Biblioteca Juan Régulo Pérez

Ana Manero García, Biblioteca Juan Régulo Pérez (Federación Española de Esperanto)

Resumen: El catálogo de una biblioteca da mucha información sobre los fondos que alberga, pero a menudo esta herramienta no se explota suficientemente. Saber cómo se organiza la información en el catálogo y de qué manera se relacionan los distintos elementos constituye el primer paso para tener éxito en las búsquedas. El segundo paso es conocer el funcionamiento del programa y sus posibilidades de búsqueda. Para estudiar todo esto tomaremos como referencia la Biblioteca Juan Régulo Pérez. En primer lugar conoceremos su catálogo en línea, que funciona con el programa Koha. Después exploraremos la Bitoteca, su biblioteca digital, que funciona con el programa DSpace. En ambos casos se trata de programas libres y gratuitos. Con ellos, la Federación Española de Esperanto presta sus servicios bibliotecarios.

Palabras clave: bibliotecas, catálogos en línea, búsquedas, programas

Autor: Bibliotecaria. Trabaja en la Biblioteca Nacional de España, donde lleva la jefatura de una de las secciones del Servicio de Catalogación. Se ocupa de la Biblioteca Juan Régulo Pérez (de la Federación Española de Esperanto) desde hace más de veinte años. En el marco de su actividad esperantista como bibliotecaria, ha sido coordinadora del Proyecto “Bitoteko”, que ha dado como resultado la puesta a disposición de la biblioteca digital de la Federación y su integración en los repositorios Hispana (del Ministerio de Cultura) y Europeana (de la Unión Europea)

– § –



La monaĥino-ciganino, poemo de Federico García Lorca el *La cigana romancaro* (1928) : interpreto kaj komparo de du Esperantaj tradukoj

La monja gitana, poemo de Federico García Lorca del *Romancero gitano* (1928): interpretación y comparación de dos traducciones al esperanto

Elvezio CANONICA, Universitato de Bordoza Montaigne, Francio

Resumo: En tiu-ĉi prelego mi proponas personan interpreton de la fama poemo de F. García Lorca, laŭ literatura analizo, kaj samtempe mi klopodos kompari du Esperantajn tradukojn de la poemo, tiun de Fernando de Diego (1971) kun tiu de Antonio Marco Botella (2014). Mi disdonos al la ĉeestantoj la tri tekstojn.

Ŝlosilvortoj: Federico García Lorca, La monja gitana, La monaĥino ciganino, interpretado, Esperantaj tradukoj

Resumen: En esta comunicación propongo una interpretación personal del famoso poema de F. García Lorca a partir de un análisis literario, y al mismo tiempo intentaré comparar dos traducciones al esperanto del poema, la de Fernando Diego (1971) con la de Antonio Marco Botella (2014). Los asistentes recibirán copias de los tres textos.

Palabras clave: Federico García Lorca, La monja gitana, interpretación, traducciones al esperanto.

Aŭtoro: Mi estas profesoro de la hispana lingvo kaj literaturo en la franca Universitato de Bordoza Montaigne. De tri jaroj, mi ankaŭ

instruas Esperanton en tiu-ĉi universitato (baza kurso por voluntuloj). Mi estas de svisa deveno, kaj mia gepatra lingvo estas la itala: mi naskiĝis en Locarno, urbo kiu situas en la suda parto de Svisio, en la italaparolanta kantono Tiĉino. Mi doktoriĝis en la svisa universitato de Friburgo per tezo pri la fremdaj lingvoj en la teatraj verkoj de Lope de Vega (1562-1635). (Kassel, Reichengerber, 1991). Ekde 2002 mi loĝas kaj laboras en Bordojo. Okaze de la UK en Seŭlo mi trapasis la KER-ekzamenon, nivelo C1 (kompleksa). Mi estas prezidanto de la asocio Espéranto-Gironde ekde 2015. Miaj eldonitaj verkoj (libroj, artikoloj, eseoj, ktp.) videblas en:

<https://u-bordeaux3.academia.edu/ElvezioCanonica>

– § –



La tranĉilo de mia onklo malpli larĝas ol lia korto

El cuchillo de mi tío es más estrecho que su patio

Dr. Katalin Kováts, redaktoro de
www.edukado.net

Resumo: La klasikaj lerniloj plenas je senutilaj frazoj kaj tekstoj, didaktikaj kaj edukaj predikoj, enuigaj, seninformaj taskoj, memcelaj banalaĵoj, kiuj neniel stimulas la lingvolernatojn je progreso kaj lernado. Kiaj estas la lerniloj, kiuj efikas ĝuste inverse? Kie trovi materialojn por kies kompreno valoras lerni pli bone la lingvon?

La redaktoro de la retejo edukado.net prezentas manierojn kaj ekzemplojn pri tio, ke instrumaterialoj povas esti en si mem intereseĝaj, povas porti novajn informojn, malfermi la mondon por la lingvolernantoj, konduki ilin al ekkono de kulturaj valoraĵoj.

La retejo havas bonajn ekzemplojn pri tiu tendenco en formo de unuopaj ekzercoj, kaj en sia KLERIGEJO ankaŭ strukturitajn seriojn de kursoj, prelegoj, studmaterialoj. La prezentotaj eroj estas tiaj, ke ilin la lingvouzanto legas por la informoj mem, kaj dume senkonscie progresas en la lingvo, riĉigas siajn lingvokonojn. En tiuj manieroj la lingvo fariĝas ilo kaj ne celo.

La ĉeestantoj ricevas informojn ankaŭ pri la novaj projektoj de la retejo, ekzemple pri la nova serio pri profesioj kaj metiejoj, kaj ekscios la

eblojn kiel mem kontribui kaj sub faka gvido fariĝi kreantoj de interesaj instrumaterialoj kaj kursoj, kiel anoj de diversaj nacioj povas trovi eblojn diskonigi sian kulturon en nia granda internacia mondo.

Ŝlosilvortoj: informriĉaj instrumaterialoj, klerigaj kursserioj, metodikaj trukoj, interkultura lernado, retaj kursoj

Resumen: Los manuales clásicos están llenos de frases inútiles y de textos, discursos didácticos y educativos aburridos, tareas vacías de contenido, banalidades autosuficientes que en manera alguna estimulan el progreso y el aprendizaje. ¿Qué materiales pueden tener el efecto inverso? ¿Dónde encontrar materiales que hagan que aprender la lengua valga la pena?

La redactora del sitio Edukado.net presenta con ejemplos modos de que el material didáctico sea interesante por sí mismo, que aporte nueva información, que abra el mundo al estudiante, que le conduzca al descubrimiento de valores culturales.

El sitio web aporta buenos ejemplos de esa tendencia en forma de ejercicios individuales, y en su apartado KLERIGEJO (“Sala de formación”) también ofrece series estructuradas de cursos, conferencias, material para el estudio. Se presentarán muestras leídas por los usuarios por su interés intrínseco y que resultan en un aprovechamiento lingüístico añadido, de manera que la lengua se convierte en medio y no en fin.

Los asistentes también recibirán información sobre los nuevos proyectos del sitio, por ejemplo de la nueva serie sobre profesiones y oficios, y conocerán las posibilidades de colaboración y de crear materiales y cursos con supervisión especializada. Como miembros de diversas naciones pueden hallar la manera de transmitir su cultura a nuestra gran comunidad internacional.

Palabras clave: Materiales didácticos con contenido, serie de cursos de formación, consejos didácticos, aprendizaje intercultural, cursos en red.

Aŭtoro: Katalin Kováts (1957), hungarino loĝanta en Nederlando en esperantlingva familio. Filologo, diplomita ĉe la universitato ELTE (Hungario) kiel lingvoinstruisto pri Esperanto, krome pri la itala kaj rusa lingvoj. Doktorigis pri la propedeŭtika valoro de Esperanto kaj gvidis pli ol ducent kursojn kaj trejnseminariojn tra la tuta mondo. La kreinto kaj redaktoro de edukado.net, kiu helpas kaj kunlaborigas instruantojn de Esperanto dise en la mondo. Kreis kaj gvidas RITE (Retan Instruistan

Trejnadon ĉe edukado.net) kaj instruas ankaŭ en Poznan ĉe la Interlingvistikaj Studoj. De dek jaroj organizanto de la KER-ekzamenoj. Aŭtoro (ankaŭ sub la nomo K. Smidéliusz) de kelkaj lerniloj kaj libroj, el kiuj pleje furoras Poŝamiko. De 16 jaroj regula kursgvidanto dum la Universalaj Kongresoj. Nuntempe tre popularas ŝia kultura, lingva kaj movadhistoria ludo, RISKO. Lanĉinto kaj organizanto de la projekto EKPAROLU!, en kiu jam en pli ol 1300 lecionoj spertaj esperantistoj paroligis skajpe komencintojn.

– § –



Esperanto priservas interkulturan edukadon

El esperanto y la educación intercultural

Mónica Molnár, Ecole de La Grande Ourse,
La Chaux-de-Fonds, Svislando

Resumo: Parolante pri la pedagogiaj valoroj de Esperanto tre ofte – kaj tute malprave – oni mencias nur ĝian propedeŭtikan valoron kvankam Esperanto portas kaj transdonas multe pli da valoroj ol nur lingva akcelilo. Diversmaniere ĝi malfermas fenestron al diversaj kulturoj, kulturaj valoroj, kiujn indas kaj endas ekspluati (ankaŭ) en la lernejoj. Ĉu tio eblas? Jes! Komencante per la lerneja korespondado, literaturaj verkoj, diversstilaj muzikoj, tra teatraĵoj, filmoj, personaj impresoj kaj ankoraŭ multaj aliaj, en mia prelego mi montros kaj pruvos, ke tio efektive funkcias en la praktiko, ke ne temas nur pri bele ornamitaj teorioj.

Nia lernejo, „La Granda Ursino” (Ecole de La Grande Ourse) en Svislando sekvas la Freinet-pedagogion. Inter la ĉefaj celoj de Freinet estis la transdono de toleremo, respekto, dialogo, kunlaboro. Li volis, ke la infanoj rimarku, kiumaniere kun alilandaj infanoj ili estas samtempe similaj kaj tamen tute diversaj. Mi prezentos miajn spertojn en tiu ĉi lernejo, kiel ni uzas Esperanton por interkultura edukado.

Ŝlosilvortoj: Interkultura edukado, kulturaj valoroj, kulturakiraj manieroj, Freinet-pedagogio

Resumen: Al hablar de los valores educativos del esperanto a menudo – y sin razón– se menciona solamente su valor propedéutico, a pesar de

que el esperanto transporta y transmite muchos más valores que la simple aceleración lingüística. De diversas maneras abre la ventana a otras culturas, otros valores culturales que merecen y han de ser explotados (también) en la escuela. ¿Puede hacerse? ¡Sí! Empezando por la correspondencia escolar, la creación literaria, músicas diversas, con obras de teatro, películas, impresiones personales y todavía muchas más maneras, en mi comunicación mostraré y probaré que todo eso efectivamente funciona en la práctica, que no se trata solo de una bonita teoría.

Nuestra escuela “La Osa Mayor” (Ecole de La Grande Ourse) en Suiza sigue la pedagogía Freinet. Entre los principales objetivos de Freinet figuraban la transmisión de la tolerancia, el respeto, el diálogo, la colaboración. Quería que los niños percibieran lo parecidos y a la vez diferentes que eran con respecto a niños de otros países. Presentaré mis experiencias de esa escuela, cómo usamos en Esperanto para la educación intercultural.

Palabras clave: Educación intercultural, adquisición cultural, pedagogía Freinet.

Aŭtoro: Molnár, Mónika – Diplomita instruisto pri informadiko, italaj lingvo kaj literaturo, kino-pedagogio, Esperanto kaj interlingvistiko, regula kunlaboranto de la revuo Juna Amiko, de la porinstruista retpaĝaro edukado.net kaj rajtigita ekzamenanto por la KER-ekzamenoj kaj por la ekzamenoj de ILEI-UEA. Vivas aktuale en Svislando, kie de pluraj jaroj ŝi estas kundirektoro de la svisa lernejo "La Grande Ourse" kaj kie ŝi instruas laŭ la Freinet-pedagogio i.a. ankaŭ Esperanton al 6-16-jaraj gelernantoj. Ŝi okupiĝas ankaŭ pri esploroj kaj eksperimentoj pri lingvolern-metodoj, estas aŭtoro de pluraj tiurilataj artikoloj.

– § –



Signo-lingvoj kaj internacia komunikado

Lenguas de signos y comunicación internacional

Karina Gonçalves de Souza de Oliveira,
Universitato de San-Paŭlo (USP)

Resumo: Signo-lingvoj estas nuntempe pli studataj de lingvistoj. Estis tempo, kiam oni eĉ konsideris, ke ili ne estis lingvoj, sed nun oni scias, ke ili estas kompletaj gramatikoj kaj havas tre interesajn erojn por la lingvistikaj teorioj. Tiu ĉi prelego prezentos ĝenerale la brazilan signolingvon, nomata LIBRAS (Língua Brasileira de Sinais, portugale), kaj ankaŭ la Internacian Signolingvon, nomata Gestuno. Ni pridiskutos la erojn de la lingvojn, la specifajn aferojn pri la surda komunumo kaj la evoluon de la studoj pri tiaj lingvoj en la lingvistika medio. Cetere interesas nin pridiskuti la neceson de taŭga ilo por internacia komunikado por tiu specifa komunumo. Pro tio, ke Esperanto rilatas al justa komunikebleco inter nacioj kaj personoj el malsamaj kulturoj, ni volas rilatigi la temon al la signo-lingvoj.

Ŝlosilvortoj: signo-lingvoj, LIBRAS, Gestuno, surda komunumo

Resumen: Las lenguas de signos son actualmente objeto de estudio de los lingüistas. Hubo un tiempo en el que se consideró que no eran lenguas, pero ahora se sabe que son gramáticas completas y que contienen aspectos de interés para las teorías lingüísticas. Esta comunicación dará una visión general de la lengua de signos del Brasil llamada LIBRAS (Língua Brasileira de Sinais), y también de la lengua de signos internacional, llamada GESTUNO. Discutiremos sobre los componentes de las lenguas, los aspectos específicos de la comunidad de sordos y la evolución de los estudios de esas lenguas entre los lingüistas. Por otra parte nos interesa analizar la necesidad de una herramienta adecuada para la comunicación internacional en esa específica comunidad. Por la relación del esperanto con la justicia en la comunicación entre naciones y personas de diferentes culturas, queremos enfocar el tema también desde las lenguas de signos.

Palabras clave: Lenguas de signos, LIBRAS, Gestuno, comunidad de sordos.

Aŭtoro: Karina Gonçalves de Souza de Oliveira diplomiĝis pri la portugala lingvo kaj pri lingvistiko en 2014, en la Universitato de San-Paŭlo (USP). Ŝia magistriĝo (2014-2016), per la sama universitato, temis pri fonologiaj adaptoj de pruntvortoj en esperanton, kaj ŝi nun doktoriĝas (2017-2020) pri la historio de la sciencaj esploroj pri Fonetiko kaj Fonologio en Brazilo dum la dua duono de la dudeka jarcento, ankaŭ per USP. Inter 2013-2014 partoprenis Instruistan Trejnadon, en Poznano (Pollando), kaj inter 2014-2017 partoprenis la Interlingvistikajn Studojn (postdiplomiĝaj studoj) en la sama urbo, en la

Universitato Adam Mickiewicz. Ŝi estis estrarano de EASP (Esperanto-Asocio de San-Paŭlo) inter 2012-2016 kaj nuntempe estas vic-prezidanto de BEJO (Brazila Esperantista Junulara Organizo), por la oficperiodo 2018-2020.

— § —



Kontakto inter kulturoj: harmonio kaj pliriĉiĝo

Contactos entre culturas: armonía y enriquecimiento

Miguel Ángel González Alfonso,
Kuba Esperanto Asocio

Resumo: La komunumo Esperanto estas vasta kaj esplorinda. La internacia lingvo Esperanto estas plenplena da kontaktoj inter kulturoj, ĉiam estiĝas harmonio pro konatiĝo de nekonataj kulturoj kiuj pliriĉigas nian kuntezoron. Spertoj de miloj da personoj tra la mondo montras ke pere de la lernado de fremdaj lingvoj aŭ de helplingvo kiel Esperanto estiĝas senfina kontakto inter kulturoj, kie harmonio multe helpas la evoluon de la pliriĉiĝo de la trafita celo. Estas mirinda paŝo ĉiam alproksimiĝi al aliulaj kulturoj per optimismo kaj espero. Ni ĉiam diskonigos niajn kulturojn, kutimojn, morojn, historiojn zorgeme, fiere kaj amike.

Ŝlosilvortoj: espero, fidela, amo, komunumo

Resumen: La comunidad esperantista es vasta y digna de estudio. El esperanto, lengua internacional, está llena de contactos entre culturas, siempre aparece armonía en el encuentro de culturas por conocer que enriquecen nuestro tesoro común. Las experiencias de miles de personas de todo el mundo demuestran que aprendiendo lenguas extranjeras o una lengua auxiliar como el esperanto se dan contactos sin fin entre culturas en los que la armonía ayuda a la evolución del enriquecimiento del objetivo finalmente conseguido. Es un paso admirable acercarse a las culturas ajenas con optimismo y esperanza. Siempre daremos a conocer nuestras culturas, costumbres atenta, orgullosa y amablemente.

Palabras clave: Esperanza, fidelidad, amor, comunidad.

Aŭtoro: Miguel Ángel González Alfonso naskiĝis la 12an de Aprilo de 1967 en Havano, Kubo. Instruisto de la angla kaj esperanta lingvoj. Helpanto de la Esperanto-Katedro en la Universitato pri Fremdaj Lingvoj “Enrique José Varona”. Verkisto de pli ol 600 poemoj. Inter la titoloj de la libroj estas “La mirindaĵo de sonĝo” (La maravilla de un sueño), “Esperanto, Fidela Amiko” (Esperanto, amigo fiel), “La Vivaĵoj” (Las cosas de la vida), “De Ameriko, mi estas filo” (De América soy hijo). Li eklernis Esperanton en 1988. Turisma Esperanto-ĉiĉerono. Fondinto kaj estrarano de la Esperanta Klubo “La Havana Kolombo”, fondinto kaj prezidanto de la Esperanta Klubo “La Najbaroj”, ambau en Kuba Esperanto Asocio. Kunlaboranto de esperantaj revuoj lande kaj eksterlande. Sukcesinto de la Meza ILEI-ekzameno. Gastiganto de Pasporta Servo. Li partoprenis internaciajn kongresojn de Esperanto kaj interrilatiĝas kun multaj esperantistoj tutmonde. Individua membro de UEA ekde 1991.

– § –



Justa komunikado kaj tutmondiĝo **Comunicación justa y globalización**

Jérémie SABYUMVA, ANEB, ILEI, UEA,
TEJO

Resumo: Laŭ difino, Tutmondiĝo rilatas al la procezo per kiu interrilatoj inter nacioj fariĝis interdependaj kaj iris preter fizikaj kaj geografiaj limoj, kiuj eble ekzistis antaŭe. Tutmondiĝo havas iujn aspektojn, efektive, influas politikon, ekonomion, kulturon, socion aŭ eĉ informojn. Ĝi reprezentas la malfermon de limoj kaj la alvenon de internacia komerco, translokigon kaj la liberan movadon de homoj kaj varoj.

Ĉu ni povas paroli pri Justa komunikado en la tutmondiĝo? Jen kion ni pritraktos en ĉi prelego. Kiam oni elpensis la tutmondiĝon, neniu antaŭpensis pri lingvaj problemoj. Multaj pensas pri la angla kiel tutmonda lingvo, kaj nun pro ekonomia kresko de multaj landoj, oni rimarkas ke potencialaj lingvoj multiĝas. Ĉiu nacio volas ekzerci influon per sia lingvo kaj suferas ofte landoj sen influoj. Ekzemple en Burundo, oni lernas 2 eŭropajn lingvojn kaj al tio aldoniĝas lingvo de la komunumo kaj nacia lingvo. Ĉu ni ni kapablos lerni ĉiujn lingvojn de «potencaj landoj» aŭ laborlingvojn de UN? Ĉu la tutmondiĝo ne

bezonas komunan kaj neŭtralan lingvon por ke homoj libere kaj egale komuniku? Ĉu UN bezonas 6 laborlingvojn? De ĉi tiuj vidpunktoj, ĝi ne nur koncernas specialistojn en la kampo aŭ la komunumon de instruistoj kaj esploristoj en ĉiuj disciplinoj: ĝi estas la afero de ĉiuj.

Resumen: Por definición, la globalización tiene que ver con el proceso por el que las relaciones entre naciones se han convertido en interdependientes y han sobrepasado las fronteras físicas y geográficas que pudieran haber existido. La globalización tiene diversos aspectos, efectivamente, e influye en la política, la economía, la cultura, la sociedad o incluso en la información. Representa la apertura de fronteras y la llegada del comercio internacional, el desplazamiento y la libre circulación de personas y bienes.

¿Podemos hablar de comunicación justa en la globalización? De ello trataremos en esta comunicación. Cuando se pensó en la globalización, nadie previó los problemas lingüísticos. Muchos piensan en el inglés como lengua global, y ahora por el crecimiento económico de muchos países, se observa que las lenguas potenciales aumentan. Todos los países quieren ejercer influencia con su lengua y eso lo sufren los países sin influencia. Por ejemplo en Burundi se aprenden dos lenguas europeas, a las que se añaden las lenguas de la comunidad y la lengua nacional. ¿Seremos capaces de aprender todas las lenguas de las potencias o las lenguas de trabajo de la ONU? ¿Puede ser que la globalización precise de una lengua neutral y común para la comunicación libre e igualitaria? ¿Necesita la ONU seis lenguas de trabajo? Desde estos puntos de vista, el tema no concierne solo a especialistas en la materia o a la comunidad de docentes e investigadores: es cosa de todos.

Aŭtoro: Mia nomo estas SABİYUMVA Jérémie, mi naskiĝis la 25-an de aŭgusto 1982, en Rumonge, suda parto de Burundo. Mi frekventis la bazan lernejon ekde 1989 ĝis 1997. Mi sekvis la unuan parton de mezgrada lernejo en la jaroj 1997-2002 en Rumonge, kaj la duan parton 2002-2005 en la ĉefurbo, Bujumbura, kie mi diplomiĝis pri Modernaj artoj (lingva sekcio ĉefe franca, angla kaj kirundi). Mi denaske parolas kirundan kaj svahilan kaj lernis anglan, francan kaj Esperanton.

Mi enskribiĝis ĉe la *Instituto nacia pri publika sano* en 2015 kaj diplomiĝis pri publika sano.

Mi en 2010 partoprenis en enkento pri malnutrado, kaj poste eklaboris en suda parto de Burundo kiel superrigardanto de sancentroj. En 2015, mi estis nomumita por nova posteno en ĵus kreita provinco de Rumonge kiel mastrumanto de sistemo pri sandonitaĵo. En lernejo, mi devis uzi francan kaj anglan, kaj tio estis problema kaj ni bezonas justan komunikadon

– § –



Kroata kultura heredaĵo

El patrimonio cultural de Croacia

Marija Belošević, ILEI, KEU

Resumo: Ĉi-jare oni festas la Eŭropan jaron de la kultura heredaĵo. Tio donas amason da ebloj prezenti, sed same ekkoni la riĉaĵon de la kontinento. Celo de ĉi tiu prelego estas proksimigi la kulture heredaĵon kaj la kulturon de la kroata popolo, kaj atentigi pri la komunaj valoraĵoj, kiujn ĝi dividas kun la resto de Eŭropo. Dum la prelego oni atentigos pri la kroata heredaĵo rekonita de UNESKO, sed ankaŭ pri la arkeologiaj kaj naturparkoj, kaj pri la riĉaĵo "kaŝita" en la monaĥejoj bibliotekoj. Tamen, estus ne juste eviti mencion pri Esperanto. Tial en la dua parto de la prelego estos prezentitaj kelkaj ekzemploj, kie Esperanto havis gravan rolon en la diskonigo de la skribitaj verkoj, ekz. traduko de la "Preĝo de Šibenik" (14 jc.) kaj traduko al Esperanto de la rakonto "Ano de l'ringludo" (1926.), kiu dekon da jaroj poste estis tradukita al la ĉina el Esperanto. Agoj hodiaŭ tute kutimaj, sed ni pensu pri tiuj jaroj kaj tiutempaj rimedoj ĉiuspecaj! Al tio aldoniĝas plia "fenomeno". Temas pri la traduko al Esperanto de verkoj de poetoj, kiuj apartenas al la kroata malplimulto en eŭropaj landoj. Per tio riĉiĝis la E-tradukita literaturo, sed same la nacia, ĉar pro diversaj kaŭzoj ili estis malmulte konataj en la patrolando. Sed, tio estas ankaŭ kontribuo al la literaturo de la lando, kie ili fakte vivas.

Ŝlosilvortoj: kultura heredaĵo, Kroatio, tradukita literaturo

Resumen: Este año se celebra el Año europeo del patrimonio cultural. Ofrece muchas oportunidades de presentar, y también de descubrir, la riqueza del continente. El objetivo de esta comunicación es acercar el patrimonio cultural y la cultura del pueblo croata, y atraer la atención

sobre los valores comunes que comparte con el resto de Europa. Señalaremos el patrimonio cultural de Croacia reconocido por la UNESCO, y también los parques naturales y arqueológicos y la riqueza “oculta” en las bibliotecas monacales. Sin embargo, sería injusto no mencionar el esperanto. Por ello en la segunda parte de la comunicación se presentarán ejemplos de cómo el esperanto ha tenido un papel importante en la transmisión de obras escritas, como la “oración de Šibenik” (siglo XIV) y la traducción al esperanto de la narración *Ano de l' ringludo* (1926), que diez años después fue traducida al chino desde el esperanto, algo completamente habitual en la actualidad, pero ¡pensemos en aquellos años y las herramientas de la época! A ello se añade otro fenómeno: la traducción al esperanto de obras de poetas pertenecientes a minorías croatas de países europeos. Con ello se ha enriquecido la literatura traducida al esperanto e igualmente la literatura nacional, ya que por diversas causas eran poco conocidas en el país. Son sin embargo contribuciones a la literatura del país en el que de hecho se dan.

Palabras clave: Patrimonio cultural, literatura traducida.

Aŭtoro: Marija Belošević naskiĝis en Zagrebo (Kroatio). Esperantiĝis en bazlernejo. Individua membro de UEA ekde 1985; membras en IKUE kaj ILEI. Siatempe estis komitatano C de TEJO, komitatano A de UEA por ILEI kaj observanto de ILEI ĉe la Estraro de UEA (1993-1997), B-komitatano de UEA (2001-2010); komisiito pri faka agado de UEA (2003-2004). Aktivas en IEK (1991-). Estrarano kaj sekretario de ILEI (1991-1998); ekde 2003 estrarano kaj vicprezidantino de IKUE; kunordiganto de la programo „Tago de Lernejo/Lernado“ (2013-2016), de 2016 komisiito de ILEI por Tago de Lernado kaj prezento de ILEI dum la UK. Gvidas E-kursojn ekde la jaro 1980. Partoprenis plurajn E-kongresojn, konferencojn kaj similajn aranĝojn dum kiuj prelegis pri la kroataj lingvo, kulturo kaj historio; pri la minoritatoj en Kroatio, kaj Kroatoj kiel minoritatoj en EU-landoj. Profesie okupiĝas pri ĵurnalismo kaj fotado. Sekretario de KEU. Aktiva en la sektoro de la neregistaraj organizaĵoj.

– § –



Lingvaj festivaloj: lingva konsciigilo sub Esperanta standardo

Festivales de lenguas: instrumentos de concienciación lingüística bajo el estandarte del esperanto

Irina Gončarova, Moskva Esperanto-Asocio MASI

Resumo: Vaste konata en Esperantujo vortkombino “Lingva Festivalo” (plue LF) tute ne signifas, ke ni ĉiuj idente komprenas ĝin. La rusia skolo de LF-movado fontas el la bazaj konceptoj de la LF- patro Dennis Keefe – kiel ni tiujn perceptis de idea kaj struktura vidpunktoj. Dum 23 jaroj en Rusio formiĝis forta LF-movado, kun firmaj organizaj kaj ideologiaj principoj, kiuj montris sin efikaj kaj disvastigindaj. Tiuj principoj estas: egaleco de ĉiuj lingvoj kaj kulturoj kaj samgrada respekto al ĉiuj el ili; demokratia bonvenigo al ĉiu preleganto, sendepende de klero aŭ aĝo; alta kvalito de ĉiuj prelegoj vidpunkte de lingvistika scienco; senĝena promocio de Esperanto kiel neŭtrala helpa lingvo kaj socikultura valoraj.

Dum lastaj jaroj LF reliefigis novan soci-kulturan fenomenon: la lingvan aktivismon. Temas pri defendo de lingvoj kaj kulturoj de multnombraj popoloj, loĝantaj en Rusia Federacio. Tio liveris al LF novajn subtenantojn kaj aktivulojn.

Ĉio dirita bonege kongruas kun la ideologio de Esperanto pri estimo al ĉiuj kulturoj kaj popoloj de la mondo. Gravas, ke mem LF-iniciantoj – eĉ se ili ne estas esperantistoj – konsciis tion kaj atentigu pri tio kaj la organizantojn, kaj la gastojn de LF. Tiu ĉi konsciigo estas jam zorgo de nur esperantistoj.

Ni esperas, ke la rusia LF-sperto povos esti utila al LF-organizantoj en aliaj landoj, malgraŭ evidenta diferenco de niaj kulturoj kaj kondiĉoj. La ĉefa alvoko niaflanke estas okazigi LF ankaŭ ekster amasaj Esperantaj aranĝoj, dum studjaro, kiam eblas pertopreno de nia celgrupo – lingve scivolema junularo.

Ŝlosilvortoj: lingva festivalo, lingva konsciigo, popularigo de Esperanto, lingva aktivismo, MEA MASI

Resumen: Por bien conocido que sea en la comunidad esperantista el sintagma “Festival de lenguas” (en adelante FL) de ninguna manera significa que todos identifiquemos su significado. La escuela rusa del movimiento FL procede de los conceptos básicos del padre de los FL Dennis Keef – como los entendemos desde el punto de vista ideal y estructural. Durante veintitrés años se ha formado en Rusia un fuerte

movimiento FL, con firmes principios organizativos e ideológicos, mostrándose eficaz y digno de darse a conocer. Estos principios son: igualdad de todas las lenguas y culturas e igual respeto para todas; bienvenida democrática a todos los conferenciantes, con independencia de su formación o edad; buena calidad de todas las conferencias desde el punto de vista de la lingüística; promoción del esperanto como lengua auxiliar neutral y como riqueza sociocultural.

En los últimos años los FL han puesto en relieve un nuevo fenómeno sociocultural: el activismo lingüístico. Se trata de la defensa de lenguas y culturas de una gran cantidad de pueblos de la Federación Rusa. Ello ha aportado a los FL nuevos apoyos y participantes.

Todo ello es coherente con la ideología del esperanto en lo que se refiere al aprecio por todas las culturas y los pueblos del mundo. Es importante que los mismos creadores de los FL –incluso sin ser esperantistas– sean conscientes de ello y así lo transmitan a los organizadores y los invitados de los FL. Esta concienciación es objetivo de los esperantistas.

Esperamos que la experiencia rusa sobre los FL sea de utilidad a organizadores de FL en otros países, a pesar de las diferencias de cultura y condiciones. Hacemos un llamamiento a la organización de FL también junto a los grandes encuentros esperantistas durante los años de formación, cuando cabe la participación de nuestro público objetivo, la juventud con curiosidad lingüística.

Palabras clave: Festival de lenguas, concienciación lingüística, popularización del esperanto, activismo lingüístico, MEA MASI.

Aŭtoro: esperantisto ekde 1967, magistro pri humanistiko ĉe Akademio Internacia de la Sciencoj San-Marino (AIS), estrarano de REU (Rusia Esperanto-Unio), fondinto (1995) kaj kunordiganto de Moskva Esperanto-Asocio MASI, inicianto kaj direktoro de 12 Moskvaj Lingvaj Festivaloj, kunorganizanto de LF en Kalugo, Ijevsko, Novgorodo, Minsko k.a.

– § –



Esperanta parolado pri astronomio. La misio Cassini-Huygens

Carlos G. Spínola, Malaga Universitato (Elektronika Sekcio), ILEI.

Resumo: Nuntempe oni parolas kaj skribas esperante pri ĉiuj sciencaj fakoj. En tiu prelego ni prezentos nunan astronomian temon, t.e. la projekton Cassini-Huygens, kiu finiĝis la pasintan septembron, kiam la spacŝipo Cassini mergiĝis en la saturna atmosfero, brulante kiel falstelo post 20 jaroj da interplaneda navigado kaj plenumado de la plej miriga kaj fruktodona esplorado tra la saturna satelita sistemo. Tiu komuna misio de la usona kaj eŭropa spac- agentejoj, NASA kaj ESA, estis planita en la 80aj jaroj, lanĉita en 1997, atingis kaj orbitis Saturnon ekde 2004 ĝis 2017, estante la unua homa spacŝipo faranta tion. La kunportita esplorsĝipo Huygens alteriĝis sukcese en la stelito Titano, malkovrante tute nekutiman mondon. Ĉi tie oni prezentos la projekton, la spacŝipojn, interplanedan vojaĝon kaj la plej elstarajn malkovrojn en la saturna satelita sistemo.

Ŝlosilvortoj: Esperanto, astronomio, interplaneda navigado, spacŝipo, planeda esplorado, gravita helpo.

Aŭtoro: Carlos G. Spinola. Li estas Magistro pri Fiziko de la Sevilla Universitato, kie li estis docento, kaj Doktoro Inĝeniero pri Komputila Scienco de la Malaga Universitato. Nuntempe li esas profesoro de la Malaga Universitato (Elektronika Sekcio). Li estas membro de IEEE (Instituto de Elektra k. Elektronika Inĝenierado) kaj de la “Planeda Societo” fondita de Carl Sagan. Ankaŭ membras en la Astronomia Societo de Malago, kaj en ĝia estraro. Ekde ĉiam li interesiĝis pri astronomio kaj la esplora kaj spaca navigado. En la elektronika fako li publikigis multajn artikolojn en internaciaj sciencaj kaj teknikaj revuoj pri industria aŭtomatiko. Li ekstudis esperanton fine de 2012 kaj ekde 2013 li partoprenas en esperantaj asocioj kaj agadoj. Li membras en ILEI ekde 2014.

Hablado en esperanto de astronomía. La misión Cassini-Huygens

Carlos G. Spínola, Universidad de Málaga (Departamento de Electrónica), ILEI.

Resumen: En la actualidad se habla y escribe en esperanto sobre todas las disciplinas científicas. Aquí se presenta un tema de actualidad astronómica: La misión Cassini-Huygens, que finalizó el pasado

septiembre cuando la nave Cassini se sumergió finalmente en la atmósfera de Saturno brillando en ella como una estrella fugaz, después de 20 años de navegación interplanetaria y de llevar a cabo la más sorprendente y fructífera exploración del sistema de Saturno y sus lunas. Se trata de un proyecto conjunto de la NASA y de la europea ESA, que fue concebido en los años 80, se lanzó en octubre de 1997, sobrevoló Venus dos veces, la Tierra y Júpiter para conseguir energía cinética de estos planetas y alcanzó finalmente Saturno en 2004, siendo la primera nave terrestre en entrar en su órbita. La sonda europea Huygens “alunizó” con éxito en Titán revelándonos un mundo insólito. Se presentarán la misión, las naves, su viaje interplanetario y los principales descubrimientos realizados.

Palabras clave: Esperanto, astronomía, navegación interplanetaria, exploración planetaria, asistencia gravitatoria.

Autor: Carlos G. Spínola. Licenciado con tesina en Ciencias Físicas por la Universidad de Sevilla y Doctor Ingeniero en Informática por la Universidad de Málaga. En la actualidad es Profesor Titular del Departamento de Electrónica de esta Universidad. Es miembro del IEEE (Institute of Electrical and Electronic Engineers) y de la “Planetary Society” (fundada por Carl Sagan), así como de la Sociedad Malagueña de Astronomía y de su junta directiva. Siempre se ha interesado por la astronomía y los proyectos de investigación y navegación espacial. En el campo de la Electrónica ha realizado numerosas publicaciones en congresos y revistas internacionales sobre aplicaciones en el campo de automatización industrial. Comenzó a estudiar esperanto a finales de 2012 y desde 2013 participa en asociaciones y actividades realizadas en esta lengua. Es miembro de ILEI desde 2014.

– § –

NOTOJ